

Letero de Bapu al Yvonne Privat
Claude Gacond, 305-a radioprelego, 1969.08.13 & 15

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La Ĉambro Edmond Privat en la Biblioteko de la urbo de La Chaux-de-Fonds posedas multajn interesajn dokumentojn. Okaze de la jaro Mahatma Gandhi ni hodiaŭ tradukos al vi la lastan leteron, kiun Gandhi sendis al Yvonne kaj Edmond Privat.

A.- Tiun leteron skribis Bapu, tio estas Mahatma Gandhi, ekzakte du monatojn antaŭ sia tragika morto.

Cl.- En tiu dokumento esprimiĝas la tristo de la granda hinda gvidanto. Tridek jaroj de neperforta luktado kondukis lian landon al politika sendependeco. Sed tiu sendependeco ne povis esti ĝoja evento por Gandhi. La hindaj britaj kolonioj, anstataŭ formi unu solan landan teritorion, dividiĝis en du malamikaj naciaroj. La religio estis la kriterio por tiu divido.

A.- Malamo kreskis. Perfortaj luktoj mortigis milojn da homoj, kiuj kelkajn monatojn antaŭe kunlaboris en neperforta batalado kontraŭ la britaj okupantoj. Gandhi sin sentis respondeca. Li provis eduki sian popolon, kaj jen, ĝi kondukas kiel la plej brutaj nacioj. Aŭdu tiun emociigan leteron :

Cl.- « *Mi vidas, ke vi bone komprenis la fundamentan diferencon inter la pasiva rezistado kaj la neperforta rezistado. Ambaŭ estas formoj de rezistado, sed la agenda prezo ege altas, kiam la rezistado estas pasiva, pasiva pro la malforto de la rezistanto.*

A.- Eŭropo eraris prenante por pasiva rezistado, kiel se ĝi estus tiu de malfortulo, la aŭdacan kaj bravan rezistadon de Jesuo de Nazareth, rezistadon ankaŭ plena je saĝo.

Cl.- *Kiam mi legis por la unua fojo la **Novan Testamenton**, mi malkovris nek pasivecon nek malforton en Jesuo tia, kia li estas priskribita en la kvar evangelioj, kaj la mesaĝo lumiĝis por mi, kiam mi legis la libron **Harmonio de la evangelioj** de Tolstoj kaj liajn samtendencajn verkojn.*

A.- Ĉu Okcidento ne pagis ege multekoste la fakton konsideri Jesuon kiel pasivan rezistanton ?

Cl.- *La kristanaro respondecas pri militoj, kiuj forpuŝas en la ombron eĉ tiujn, kiuj estas priskribitaj en la **Malnova Testamento** aŭ en aliaj historiaj aŭ duonhistoriaj dokumentoj. Mi scias, ke tion dirante, mi povas erari, ĉar mi povas pretendi nur pri tre supra kono pri la moderna aŭ antikva historio.*

A.- *Por alveni al mia persona eksperimento, se nia politika sendependiĝo, kiu entuziasmigas en Okcidento la pacamikojn kiel vin kaj vian afablan edzon, estis akirita per la rimedoj de la pasiva rezistado, ni pagos ege multekoste ĉiutage la eraron, kiun ni senkonscie faris, aŭ pli bone, kiun mi faris, konfuzante pasivan rezistadon kun neperforta rezistado.*

Cl.- *Se mi ne estus farinta tiun eraron, la humiliga spektaklo, vidi feblan fraton nehome kaj senpripense mortigi sian feblan fraton, estus al ni evitata.*

A.- *Mi esperas kaj mi preĝas, kaj mi demandas al ĉiuj miaj amikoj, tie ĉi kaj en la aliaj mondpartoj, esperi kaj preĝi, por ke tiu sangverŝo baldaŭ ĉesu, kaj por ke el tiu eble neevitebla buĉado naskiĝu Hindio nova kaj fortika, ne militema pro malnobla imito de Okcidento en ties hideco, sed Hindio nova, asimilanta la plejbonon, kiun Okcidento havas por doni, kaj iĝanta la espero ne nur por Azio kaj Afriko, sed por la tuta suferanta mondo.*

Letero de Bapu al Yvonne Privat
Claude Gacond, 305-a radioprelego, 1969.08.13 & 15

Cl.- *Mi devas konfesi, plue skribas Gandhi al Yvonne Privat, ke tio estas esperi kontraŭ ĉia espero, ĉar hodiaŭ ni nur ĵuras per la milita potenco kaj per io, kio implikas la fizikan trudon tute nudan.*

A.- *De post pli ol du generacioj niaj ŝtatestroj protestis kontraŭ la pezo de la armadaj elspezoj sub la brita regado, sed nun, kiam ni estas liberigitaj de la politika servuto, niaj militaj elspezoj plialtiĝis kaj minacas ankoraŭ plialtiĝi, kaj ni fieras pri tio !*

Cl.- *En niaj leĝfaraj konsilantaroj eĉ ne unu sola voĉo aŭdiĝas por ilin kontraŭbatali.*

A.- *Tamen, malgraŭ la demenco kaj la vana imitado de la falsa brilo de Okcidento pluekzistas en mi kaj ĉe multaj aliaj la espero, ke Hindio ne mortos pro tiu Mortdanco, kaj ke ĝi atingos la moralan nivelon, kiu devus aparteni al ĝi post tiu eĉ neperfekta sindediĉo al la neperforto dum periodo de tridekdu jaroj, sen interrompo, depost 1915.*

Cl.- Mahama Gandhi finis tiun leteron, kies ĉefajn partojn ni tradukis por vi el la speciala numero de la revuo *Revue Neuchâteloise* dediĉita al Edmond Privat, dirante :

A.- *« Mi min demandas, ĉu neniam vi revenos en Hindion, ĉu neniam vi vidos ĝin, ne en ĝia frenezo, sed en saĝo penetranta ĉiujn viv-sektorojn. »*

Cl.- En tiu interesa numero de la revuo *Revue neuchâteloise* troviĝas du aliaj tekstoj de Gandhi : la pasporto, kiun la hinda gvidanto skribis por Edmond kaj Yvonne Privat en tragika situacio la 31-an de decembro 1931 kaj letero, kiun Gandhi skribis en malliberejo. En ĝi li donas informojn pri tiu restado en karcero, kie la neperforta luktado plu daŭras, sin esprimante en neatendita manlaboro :

A.- *« Ni provas esti utilaj. Mahadev kaj mi okupas multajn horojn ŝpinante kaj studante. Sardar produktas riĉaĵojn farante kovertojn el bruna rub-papero, kaj tiuspecajn aĵojn. Tiun leteron mi metos en tian koverton.*

Cl.- La publikigo de la korespondado inter Bapu, tio estas Mahatma Gandhi, kaj Edmond Privat kaj Yvonne Privat, estos tute certe tre interesa dokumento. Sed unue estas necese ordigi tiun riĉan dokumentaron de la Ĉambro Edmond Privat. Al tio laboras profesoro Pierre Hirsch kun sinjorino Frei, sindonema bibliotekistino.

A.- Por la grupoj, kiuj tion petas, ni aranĝas vizitojn de tiu Ĉambro Edmond Privat kaj de la Centro de Dokumentado kaj Studado pri la Lingvo Internacia.

Cl.- La 15-an de junio ni tiel havis la okazon aranĝi internacian piknikon por kvardeko da esperantistoj el la urboj Genève, Lausanne kaj Besançon.

A.- Okaze de tiu manifestacio ni legis tre interesan leteron de Hector Hodler al Edmond Privat. La venontan semajnon ni legos ĝin al vi.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-